# AMERIKA ESPERANTISTO

MAY, 1913

# The New Testament

## IN ESPERANTO

Translated from the original Greek by a special committee whose care and competence assure a thoroughly accurate and correct rendering.

White Paper Edition:
- No. 1. Art Cloth Gilt, 45 cents.
- No. 2. Limp French Morocco, 60 cents.
- No. 3. Leather-lined Persian Yapp, $1.50.

India Paper Edition:
- No. 4. Limp French Morocco, 90 cents.
- No. 5. Leather-lined Persian Yapp, $1.75.

EVERY ESPERANTIST WANTS A COPY.

EVERY MINISTER SHOULD BE SUPPLIED WITH A COPY.

EVERY PUBLIC LIBRARY NEEDS AT LEAST ONE COPY.

The present edition is limited, and there may be much delay before another appears. Therefore send your order at once.

THE AMERICAN ESPERANTIST CO.
WEST NEWTON, MASS.

## THE AMERICAN ESPERANTO BOOK

Standard Edition, cloth bound, postpaid for $1.00
With *new* subscription to **Amerika Esperantisto, $1.50**
AMERICAN ESPERANTIST CO., West Newton, Mass.

# Amerika Esperantisto

## American Esperantist

Entered as second-class matter May 15, 1913, at the Postoffice at West Newton Station, Boston, Mass., under the Act of March 3, 1879.

*Published Monthly by*

**THE AMERICAN ESPERANTIST COMPANY (Inc.)**

**West Newton, Mass.**

**ONE DOLLAR A YEAR** **Eksterlande $1.25 (Sm. 2.50)** **SINGLE COPY TEN CENTS**

Mallongaj verkoj, tradukaĵoj kaj novaĵoj estas ĉiam prefere akceptitaj. *Oni ne resendas* neakceptitajn manuskriptojn, se la sendinto ne kune sendis la resendpagon. La Redakcio konservas por si la rajton korekti manuskriptojn laŭbezone.

**Vol. 13** **MAY, 1913** **No. 4**

## Grava Anonco

Ni anoncas al la abonantoj al AMERIKA ESPERANTISTO, aĉetantoj ĉe la librejo de The AMERICAN ESPERANTIST COMPANY kaj korespondantoj de ĉi tiu Kompanio, ke ĝia oficejo translokiĝos de Washington, D. C., ĉirkaŭ la 15a de aprilo, al WEST NEWTON, MASS.

Oni sendu ĉiujn abonojn, mendojn, k. t. p. de nun al la jena adreso:

**THE AMERICAN ESPERANTIST CO. (Inc.)**
**West Newton, Mass., Usono.**

THE AMERICAN ESPERANTIST CO. is now, for the first time in its history, in a position to furnish printing of any description. A practical printer of long experience is at your service and will be glad to advise you in regard to your printing problems, and quote prices on anything you need in this line. By giving us your patronage you will be sure of good service and at the same time will be helping YOUR magazine in a financial way. TRY US.

## Important Announcement

Notice is hereby given to all subscribers to AMERIKA ESPERANTISTO, and the customers of the Book Department of THE AMERICAN ESPERANTIST COMPANY, that the business offices will be removed from Washington, D.C., on or about April 15th, to WEST NEWTON, MASS. (Boston Postal District).

All renewals, subscriptions, orders, etc., should hereafter be addressed to

**THE AMERICAN ESPERANTIST CO. (Inc.)**
**West Newton, Mass.**

N. B.—This has no effect upon the affairs of the Esperanto Association of North America, whose central office remains, for the present at least, at Washington, D. C.

**The New Management wishes**

To thank Mrs. Reed for so kindly consenting to edit this number of Amerika Esperantisto. With our shoulders burdened with the immense mass of detail work connected with assuming the management of a business of this kind, it was a physical impossibility to undertake the editorial work this month. Again—thank you.

To announce that we have arranged with Sro. Edmond Privat to act as our European correspondent, beginning with the June number. Sro. Privat needs no introduction to our readers, or to any one who has read his books, "Karlo" (15c), "Tra l'Silento" (40c in parchment binding with red and gold lettering, 60c in limp chamois with gold lettering), or studied "Esperanto in Fifty Lessons" (cloth 50c). We consider him one of the best living Esperantists and our readers are extremely fortunate that we have been able to secure his services. Now listen! We don't want to give you the good news all at once, but he's going to do something else for us and we'll tell you all about it in the June number. It's going to make YOUR magazine a mighty interesting publication and you will not want to miss a single number, for if you do you will miss something GOOD. Don't under any circumstances let your subscription lapse. Look for the announcement in the next number.

To apologize for the small size of the present number, which has, like yon Cassius, "A lean and hungry look." For mechanical reasons we have thought best to reduce the size of the pages for more economical production and after this number will make up the deficiency by giving you more of them. We believe the change to a slightly narrower page with the lines running clear across will make the magazine easier to read and improve the typographical appearance.

# LA PORTRETO DE LA REĜO

DE MARIE LOUISE HACKETT

ANTAŬ multaj jaroj, dum mi veturadis tra la provincoj de Kanado, estis mia kutimo viziti tie ĉi kaj tie francajn familiojn, kaj peti ke ili rakontu al mi historiojn kaj memorindaĵojn, kiujn iliaj praavoj eble kunportis el tiu malproksima lando Francujo, por kiu ili ĉiam sentis grandan amon.

Unufoje mi vizitis tre malriĉan domon, proksime de Chicoutimi. Ĝi konsistis el nur du ĉambroj, unu uzata kiel kuirejo kaj manĝoĉambro, kaj la alia kiel dormoĉambro, por la tuta familio de Sinjorino La Porte, ŝia edzo, ŝia avo, kaj ŝiaj du filoj.

S-ino La Porte ne estis plu juna, kaj la infanoj, kiuj havis la aĝojn de ses kaj ok jaroj, ne ŝajnis aparteni al tiuj ĉi maljunaj geedzoj.

Gaspard La Porte, inda viro, laboris de frua mateno ĝis la nokto kiel lignohakisto en la Laŭrentiaj montoj. Kelkfoje li forestis de la domo dum semajnoj kaj la malgranda monsumo, kiun li perlaboris, apenaŭ sufiĉis por pagi la ŝuldojn kiuj restis ĉiam nepagitaj.

La avo, tiel maljuna ke la jaroj de la estinteco al li ŝajnis kiel sonĝo, tiel proksima de la morto kaj tamen vivanta, estis por la kompatinda virino tre peza ŝarĝo. Ŝi tre amis lin, tiun maljunan avon, kaj kvankam estis parte lia kulpo ke la malriĉeco estis enveninta en ilian vivon ŝi tre malofte plendis.

Nur de tempo al tempo, kiam ilia sorto plimalboniĝis, ŝi riproĉis lin pro lia memamo kaj indiferenteco al ŝi, ĉar malgraŭ lia aĝo de naŭdek tri jaroj liaj sentoj bone funkciis, lia spirito estis ankoraŭ sagaca, kaj li sciis iom da ĉio, kio okazis en la domo.

La historio de tiu ĉi maljunulo estis stranga. S-ino La Porte rakontis ĝin al mi unu tagon, kiam mi alportis ludilojn al ŝiaj infanoj.

Li estis tre juna soldato en la militistaro de Louis-Phillippe. Unu tagon kiam la reĝo, revenante de parado en la Place de la Bastille troviĝis en la Rue St. Antoine, tiu ĉi juna soldato nomita Cóme Letellier, sciante iom pri la revoluciaj ideoj de la popolo, ĵetis sin antaŭ la kaleŝon de la reĝo, kriante, "Gardu vin, Via Moŝto, estas granda danĝero!"

La kaleŝo tre rapide preterpasis, kaj ĵus poste eksplodis la bombo de Fieschi, vundante multajn personojn. Cóme Letellier reiris al siaj kamaradoj iom timigite pro sia bravegeco.

Post kelkaj semajnoj oni kondukis lin antaŭ la reĝon, kiu, iom kortuŝita pro la okazo, demandis kion li deziras kiel rekompencon.

"Nenion, Via Moŝto," li respondis.

"Kiel?" diris la reĝo, "Nenion por savi la vivon de la Reĝo de Francujo?"

"Nu, mi tamen faras al vi tiun ĉi proponon; ke vi trinku al la sano de la Reĝo de Francujo el mia glaso, aŭ ke mi donacu al vi bienojn aŭ oron."

Sen ŝanceliĝo Cóme Letellier respondis. "Via Moŝto, mi preferas trinki el via glaso; tiu honoro pli valorus por mi ol riĉeco aŭ bienoj. Mi estas simpla soldato kaj la riĉeco ne konvenus al mi."

"Mia knabo," diris la reĝo, "Vi bone elektis. Trinku do, al la Reĝo de Francujo, kaj reciproke mi donos al vi ion por konservi kiel memoraĵon pri mi, ĉar via fideleco kaj kuraĝo ja meritas rekompencon."

Post multaj monatoj Cóme Letellier ricevis portreton de la reĝo, pentritan sur eburo, kaj enkadrigitan en tiel peza kadro, ke estis malfacile teni ĝin eĉ per la du manoj.

Li ĉiam konservis ĉi tiun tre amatan donacon, kaj poste, kiam en Francujo okazis tiel multe da malfeliĉaĵoj por la reĝamantoj, la eksiĝo de la reĝeco de Louis-Phillippe, la respubliko de mallonga daŭro, la enveno de la dua imperio sub Napoleon III, kaj poste la teruroj de la "Commune," li venis Kanadon, kune kun sia familio, kie ili multe suferis. Ĉiam, kiam ilia malriĉeco tro peziĝis, la infanoj deziris vendi la portreton, kiu, ili diris, alportis al ili malbonŝancon, sed Cóme Letellier neniam volis ĝin fordoni. Li amis ĝin same kiel la vivon mem. Ĝi estis lia religio.

La portreto okupis honoratan lokon sur la kamena breto, kaj kiam estis en la domo sufiĉe da pencoj, kandelo ĵetis siajn malfortajn radiojn sur tiun misteran vizaĝon. Multaj personoj proponis doni grandajn monsumojn por la pentraĵo kaj kelkfoje ne estis facile reteni ĝin de la manoj de malkonsciencaj kolektistoj de antikvaĵoj, pro ĝia valoro kaj historio. Sed la maljunulo ĉiam rifuzis vendi ĝin.

Tiam la maljuna avino kaj poste la fortaj filoj unu post la alia mortis, kaj el tiu ĉi granda familio restis nur Antoinette, la filino de lia plej juna filo. Ŝi edziniĝis je Gaspard La Porte, kaj post multe da jaroj de seninfana edzeco pri kiu la avo malfavore parolis, ŝi naskis ĉi tiujn du knabojn, unu baldaŭ post la alia.

"Kaj, Sinjoro," ŝi diris, "Ĉu mi faris bone donante vivon al tiuj ĉi du kreitaĵoj? Ĉu mi havas ion por doni al ili? Mia patro ofte parolis kun mi pri la malriĉeco kaj mizero kiujn la tuta familio de la avo devis suferi, post kiam li ricevis ĉi tiun faman pentraĵon. Nenio krom malbonŝanco, nenio krom malriĉeco. Kiom valoris trinki al la reĝo, se la tuta familio devas tial suferi? Kiom utilas rifuzi grandan riĉecon, se la stomakoj de la infanoj estas ĉiam malplenaj? Kiom utilas konservi tiun ĉi malbenitan portreton, kvankam multaj perso-

noj jam estas venintaj por aĉeti ĝin altpreze? Mi neniam multe diris, Sinjoro, sed la tutan maldolĉecon de mia vivo, ĉiujn seniĝojn kiujn mi estas suferinta, kiujn miaj gepatroj suferis, kaj kiujn miaj filoj suferos,—diru al mi Sinjoro, ĉu vi opinias ke egoisma maljunulo havas la rajton ilin trudi sur nin?"

Malforta voĉo sonis el la apuda ĉambro, kaj la avo ekkriis, "Antoinette, alportu la portreton por ke la Sinjoro povu vidi ĝin pli bone. Zorgu ke ĝi ne rompiĝu. Ĉu vi ne scias ke la honoro esti salutinta persone la elektiton de Dio pli valoras ol ĉiuj sensignifaj aferoj de la mondo, je kiuj vi tiel fervore sopiras? Ha, la juneco kiu scias tiel malmulte, kiu volas tiel malmulte! Toinette, mi estas vidinta preterpasi multajn jarojn, multajn malĝojojn, mian edzinon, miajn infanojn, kaj nun nur vi restas al mi, kaj vidu, kiel malbona vi estas! Ĉio kion mi faris estis bonintenca. Zorgu ke nenia malbonaĵo okazu al tiu ĉi kara objekto, la memoraĵo de mia estinteco, la trezoro de mia vivo, la espero de mia maljuneco, kaj mi ordonas ke vi gardu ĝin kiel mi jam ĝin gardis. Ha, se mi povas kunpreni ĝin preter la tombo! Sed mi testamentas ĝin al vi por viaj infanoj, kaj de generacio al generacio la mondo scios kiamaniere la bona reĝo honoris la malriĉan Cóme Letellier."

S-ino La Porte dume estis alportinta al mi la portreton. Ĝi estis efektive tre peza, kaj mi demandis min kial simpla plumba kadro povas tiel multe pezi. Ĝi havis strangan formon; la supraĵo plata, kie estis belege pentrita la reĝa portreto, kaj la posta flanko tute kovrita per plombo, kiu ŝajnis glata kaj polurita, kvazaŭ ĝi estis ofte frotita.

Tiam la avo, kiu estis irinta al la kameno, komencis longan denuncadon kontraŭ la juneco kaj ĝia malsaĝo. Li parolis per voĉo kiu ŝajnis ĉiumomente pli ekscitata kaj tremema. Liaj okuloj havis nekutiman brilon, kaj mi vidis ke tre subita ŝanĝo okazis en li, kvazaŭ liaj fortoj tiel longe konservitaj, komencis foriĝi.

S-ino La Porte fikse rigardis lin, kaj ŝi ankaŭ ekscitiĝis. "Nu, mia knabino," diris la maljunulo, "remetu la Reĝon sur lian tronon. Zorgu, malbona filino."

Ŝi prenis la portreton per ŝiaj manoj, kaj je la tuŝo de la peza ŝarĝo, kiu ĉiam estis ĝeninta ŝin, kaj laŭ la deziro de la maljunulo ĉiam ĝenos, ŝi koleriĝis, kaj ne pensante pri la konsekvenco, sen timo pri sia ago, ŝi ĵetis per sia tuta forto la malbenitan objekton en la kamenon, kie ĝi rompiĝis kun bruego en mil pecoj sur la fajrujo.

Kun kortuŝinta ekkrio la avo levis sian bastonon kaj antaŭeniris al sia nepino, sed li ŝancelis, lasis fali la bastonon, kaj etendante la manojn al la malplena loko de la amata portreto, kun ploregoj kompatindaj, li falis senviva sur la plankon.

S-ino La Porte en agonio de memriproĉo ĵetis sin sur lin kaj per voĉo plena je larmoj petis ke li pardonu ŝin.

"Kara, kara avo," ŝi kriis, "Pardonu al mi, mi ne intencis agi malbone, sed en mia kolero mi ne sciis kion mi faris. Mi ĵuras ke mi povos rebonigi ĝin."

Sed, ĉar la maljunulo ne respondis, ŝi ree kriis, "Dio mia, Sinjoro, mi mortigis lin," kaj preskaŭ freneza pro timo kaj malĝojo, ŝi elkuris el la ĉambro por venigi la pastron.

Mi iris al la kameno kaj vidis la infanojn ludantaj kun la falintaj pecoj. "Rigardu, Sinjoro, rigardu, ĉi tiujn belajn oraĵojn, kiel ili brilas!" kaj ili ĉirkaŭĵetis ilin kaj dancis pro ĝojo.

Mi prenis kelkajn pecojn en la manoj; ili estis moneroj tute novaj, kvazaŭ ili ĵus elvenis el la monerfabriko. Tiam mi diris al mi mem, "Tio klarigas la formon kaj la pezon de la kadro; la reĝo estis bone kaŝinta sian ideon, kaj Cóme Letellier ne estis malprava, gardante tiamaniere sian donacon dum tiom da jaroj." Sed mi ne povis kredi ke la maljunulo ion sciis pri ĝia valoro; estis nur lia amo kaj lojaleco kiuj igis lin konservi tiel zorge la memoraĵon de la reĝo. Jen estis eble tridek moneroj, ĉiu valoranta dudek frankojn, kaj konsiderante ilian staton kaj historion mi profetis por tiu ĉi inda familio bonan sorton. S-ino La Porte baldaŭ revenis kun la pastro, kaj ŝi estis tiel surprizata vidante kun kio la infanoj ludis, ke ŝi falis sur la genuojn inter ili, kaj ploregis kaj kisis ilin milfoje. "Ho, la kara avo estis prava," ŝi diris, "kaj kiel malfeliĉa mi estas ke li ne plu estas ĉi tie."

La pastro konsolis ŝin, kaj diris ke ne estis ŝia kulpo ke la morto sekvis lian ekscitegon, li estis rimarkinta de longa tempo grandan ŝanĝon en la avo, estis la volo de Dio ke ĉio tiel okazu, estis Lia maniero rekompenci ŝin post tiom da jaroj de malriĉeco kaj malĝojo.

"Surprizos kaj ĝojigos mian edzon vidi la oron," ŝi diris. "Mi vidas ĉi tie bonstaton por miaj infanoj, kaj komforton por ni mem. Eble mi havos dum la estonteco la ĝojon vidi unu el miaj filoj dediĉanta sin al la servo de Dio."

S-ino La Porte petis ke mi afable kunprenu la monerojn por ekscii ilian valoron, kaj post varma manpremo mi foriris honorata per ŝia konfido.

"Mi baldaŭ revenos, knaboj; kion vi volas ke mi alportu al vi, Andre?" mi diris al la pli juna.

"Pafilon por mortigi la malamikojn de la Reĝo," li respondis.

"Kaj vi, Gaspard, kion vi deziras," al la alia knabo.

"Kio estas Reĝo por mi?" li diris. "Donu al mi bonan manĝaĵon por ke mi estu sana kaj forta."

La persista ideo de la tuta vivo de Cóme Letellier postvivis en la

animo de unu el tiuj infanoj; en la animon de la alia estis veninta la moderneco kaj ideoj praktikaj, kvankam malpli idealaj.

*El la franca tradukis,*
LA ALBANY ESPERANTO KLUBO.

---

## ESPERANTISMO

I

ESTIS malbela vespero en frua Novembro. El nigra ĉielo la pluvo falis amase kaj la senĉesa frapado de gutoj sur la dometon estis malbona signo al Ivan Petroviĉ. De tempo al tempo li malfermis la pordon kaj elrigardis, kaj ĉiufoje revenis kun pli maltrankvila vizaĝo. Kiam li por la centa fojo estis rigardinta la ĉielon li skuis la kapon kaj diris al la edzino:

"Estas terura pluvego, Anjo. La rivereto jam estas forta torento kaj la akvo staras nivela kun la kokejo."

"Ĉu vere? demandis la edzino kun paliĝanta vizaĝo.

"Jes, mi timas ke la elfluejo ĉe la ponto estas tro malgranda por forporti la akvon, aŭ eble ĝi eĉ estas ŝtopita, ĉar la akvo senhalte altiĝas. Se la pluvego ne baldaŭ ĉesos mi timas katastrofon."

"La domo certe ne estas en danĝero?" demandis la edzino timeme. "Estas neeble ke la pluvo longe daŭros; jam pluvis tri tagojn."

"Jes, Anjo, sed memoru ke ni estas en Usono nun, ne en Rusujo, kaj en ĉi tiu parto de Ameriko ni havas pluvon anstataŭ neĝo dum la vintro. Miaj kunlaborantoj diris al mi hodiaŭ ke ofte la pluvo falas tutan semajnon; ja eĉ du tri semajnojn, preskaŭ senĉese. Ni havas nun la plej malbonan parton de la vintro kaj ne estas neeble ke la pluvo ankoraŭ daŭros dum kelka tempo. Se ĝi tion faros la dometo estos en danĝero."

Dum la vespermanĝo Ivan sidis en profunda meditado. Liaj pensoj reportis lin al malproksima Rusujo, kaj li travivis unu fojon plu sian vivon en tiu lando. Antaŭ malpli ol unu jaro li loĝis kune kun la edzino kaj la du malgrandaj infanoj sur bieneto en suda Rusujo. Li estis malriĉa homo, kaj la malbona jam eluzita tero donis al li tiel malmulte ke ĉiu jaro vidis lin pli proksime al bankroto. La edzino mem devis labori kiel viro, kaj la infanoj, kiuj jam estis sufiĉe grandaj por iri al la lernejo, ankaŭ devis helpi je la hejmaj laboroj. Ju pli malbone la aferoj staris ĉe Ivan des pli li malŝatis sian bienon, kaj des pli li sopiris al Ameriko; "la lando de oro," kiel li nomis ĝin. En tiu lando li ne timus malsukceson; tie la edzino ne bezonus laboradi en la kampoj, kaj tie li povus bone eduki la infanojn. Li ko-

mencis legi pri Usono, pri ĝia popolo, pri ĝiaj grandaj urboj, pri la vastaj bienoj de okcidenta Usono, kaj ju pli li legis des pli lia entuziasmo kreskis. La edzino ankaŭ montris grandan intereson pri la nova mondo, kaj la infanoj senĉese faris demandojn pri ĝi. Unu tagon kiam entuziasmo estis febre alta Ivan revenis el la proksima urbeto, kaj inter aliaj aferoj li kunportis kopion de *Amerika Esperantisto*, kiun li ĉiam legis kun plej granda plezuro. Post la vespermanĝo li prenis la gazeton kaj laŭte legis al la edzino, kiu mem bone posedis la internacian lingvon. Tiam li trovis mallongan reklamon pri urbo A—— en la nordokcidenta angulo de Usono, kaj la reklamo petis ke ĉiu interesulo skribu en Esperanto al la komerca klubo de tiu urbo. Ivan skribis, petante informojn pri la kondiĉoj, kosto de vivado, kaj cetere, en okcidenta Usono, kaj post nelonga tempo ricevis respondon. Li interŝanĝis ankoraŭ kelkajn leterojn, tiam vendis sian bienon, kaj kune kun la familio ekveturis al Pacifika Usono.

Estis feliĉa tago por la fremduloj kiam ili alvenis al la urbo A——. La esperantistoj de la urbo faris sian eblon por helpi la rusajn samideanojn kaj jen unu jen alia membro de la klubo gastigis la familion. Ili baldaŭ trovis lokon por Ivan en granda fabrikejo, kie li havis daŭran kaj ne malbonan okupon. Ne plu timante mankon da mono Petroviĉ aĉetis terpecon proksime de la fabrikejo en longa malvasta valeto tra kiu fluis tre malgranda rivereto. La tero estis riĉa kaj ne tro seka; kaj tie ĉi la herbo estis verda, kvankam en aliaj lokoj ĝi jam estis brulita de la suno. La rivereto ŝajnis al li tre bela kaj li ne povis diveni ke ĝi iam povus fariĝi danĝera torento. Li tial konstruis dometon apud la rivereto kaj la vivo en la nova lando trankvile fluis ĝis la vespero en Novembro pri kiu ni jam parolis.

## II

La pluvo ankoraŭ falis kaj la konstante kreskanta ventego pli kaj pli maltrankviligis la geedzojn. Eĉ la infanoj estis malgajaj kaj sidis kviete en angulo kaj ploretis. Super la fajfado de la ventego estis aŭdebla la pli laŭta bruego de la rivero, kiu nun havis la amplekson de granda lago. Colon post colo altiĝis la akvo kaj la dometo estis preskaŭ ĉirkaŭita.

Ivan eliris por ankoraŭ studi la situacion sed nenio estis farebla kaj li baldaŭ revenis.

"Estas pli bone ke ni tuj forlasu la domon," li diris malespere. "La pluvego estas pli forta ol iam kaj la akvo senhalte kreskas. Baldaŭ la domo estos ĉirkaŭita kaj ni devas foriri antaŭ ol la akvo estos tro alta."

"Jes,—eble estas pli bone," respondis la edzino kun malĝoja

sopiro. "Ho, Ivan, mi ne volas pensi pri la perdo de nia beleta hejmo," kaj je tio ŝi laŭte ekploris.

"Trankviliĝu, Anjo," diris la alia kompate. "Ankoraŭ la domo staras kaj eble la morgaŭ ĉio ree estos bona. Sur la proksima altaĵo, kiel vi scias, estas vakanta dometo kaj sendube oni ne malpermesos ke ni restu en ĝi ĝis la akvo malaltiĝos. Sed ni rapidu; la tempo estas valora."

Estis jam malfrua nokto kiam la laboro de transloĝiĝo estis finita; la infanoj trankvile dormis, kaj la geedzoj, al kiuj dormo estis neebla, sidis apud malnova, disfalanta forneto kaj aŭskultis al la batalo de la elementoj; atendante, horon post horo, la neeviteblan rompiĝon de la ponto.

Frue en la mateno ĝi okazis. Kun surdiga bruego la grandaj traboj disfalis kaj la liberigita akvo kuregis antaŭen portante kun si la dometon de Petroviĉ.

Estis terura frapo por la fremduloj kaj kun tuta sia koro Ivan bedaŭris ke li iam forlasis Rusujon. Kun ĉio perdita, kun la belaj revoj neniigitaj, li vidis nur mallumon antaŭ si kaj la estonteco ŝajnis al li mokaĵo.

III

Estas malnova diro ke nigra nubo estas nur la malsupraĵo de io hela, kaj kiam ĉio ŝajnis al Ivan plej malluma, helpo staris proksime.

Estis la vespero post la katastrofo. La familio estis ĵus fininta sian manĝon kiam ili subite ekaŭdis gajajn voĉojn ekstere, tiam frapadon sur la pordo kaj en la sekvanta minuto la pordo malfermiĝis kaj jen staris la tuta esperantistaro de la urbo. Unu el la sinjoroj portis grandan korbon kiun li metis sur la tablon kaj post bonkoraj salutoj la prezidanto de la klubo—konata leĝisto—ekparolis.

"Amikoj," li komencis, sin turnante al la geedzoj, "ni legis kun profunda bedaŭro pri la katastrofo tie ĉi kaj pri la perdo de via beleta hejmo, kaj ni venas ĉe vin por montri nian simpation, kaj por, se eble, helpi vin el via malfeliĉo. Sendube la perdo de via hejmo ŝajnas al vi neriparebla, ĉar en viaj vizaĝoj mi vidas nur malĝojon kaj malesperon. Mi havas la plezuron, tamen, certigi al vi ke post kelkaj monatoj vi ree havos vian hejmon. La rekta kaŭzo de via perdo estis la malboneco de la ponto, kaj pro tio la urbo mem devos repagi vin por via perdo. Oni ankaŭ rekonstruos la ponton tiel ke ĝi neniam estonte povos haltigi la akvon kaj tial vi neniam bezonos timi alian superakvegon. Por viaj tujaj bezonoj la sinjorinoj ankaŭ zorgis kaj en la korbo vi trovos ion por via manĝotablo.—— "Kaj nun," li daŭrigis post mallonga silento, "ni devas foriri; post la terura nokto kiun vi hieraŭ travivis vi sendube bezonas ripozon."

Kiam la geedzoj ree estis solaj ili prenis la korbon kaj je la vido de la bongustaĵoj iliaj vizaĝoj ekbrilis de ĝojo. Eñ la fundo de la korbo kuŝis monujo kaj kiam Petroviĉ malfaldis ĝin jen estis du cent dolaroj!

En la okulojn de la edzino venis larmoj de feliĉo. "Tio," ŝi diris per tremanta voĉo, "tio estas vera frateco."

"Jes, Anjo," respondis la edzo per esperplena voĉo, "jen estas vera esperantismo."

LEHMAN WENDELL.

## ĜIS LA REVIDO

Hodiaŭ mi diras adiaŭ al vi legantoj, kiel redaktoro de AMERIKA ESPERANTISTO; tamen kiel Esperantistino mi diras al vi samideanoj "Ĝis la Revido."

Antaŭ preskaŭ kvin jaroj mi komencis labori en la Esperanta Movado, unue kiel neoficiala netitolita helpanto, poste kiel ano de la Aga Komitato, kaj unu el la organizantoj de la Sesa Kongreso, kaj dum la du pasintaj jaroj kiel redaktoro de via gazeto AMERIKA ESPERANTISTO. Sub ĉi tiuj cirkonstancoj estus superflue diri ke mi ja bedaŭras la neceson forlasi la redakcian laboron. Sed, ĉar mia edzo kaj mi jam estas donintaj kvin jarojn el nia vivo al la amata Esperanta Movado, ni sentas nun la devon ree atenti niajn proprajn aferojn, kaj enspezi anstataŭ elspezi monon.

Multe mi ĝuis la Esperantistan vivon, kaj ĉiam mi dankos al Esperanto pro multaj bonaj amikoj. Al tiuj mi esprimas koran saluton, kaj mi petas, mi petegas, ke vi forte subtenu la novan direktoron, S-ron Ernest F. Dow, kiu meritas vian tre fervoran helpon, kaj kiu multe antaŭenpuŝos Esperanton, se vi ĉiuj ebligos tion al li. Mi konsilas al iuj, kiuj ŝajne preferas kritiki plivole ol helpi ĝis nun, ke ili pensu pri la vortoj, "Unuiĝite ni staras, dise ni falas." Anstataŭ malĝentile kritiki tiujn, kiuj laboras laŭ sia eblo por via amata Movado, helpu ilin, proponu trankvile viajn ideojn, kaj ne riproĉu se oni ne povas akcepti ĉiun ideon, plenumi ĉiun proponon! Senĉese kunlaboru laŭ la metodoj anoncotaj, eĉ se vi mem ne proponis kaj eĉ ne aprobas ilin! Ne forgesu gratuli pri sukcesoj, eĉ se iaj sukcesoj rezultas el metodoj aŭ agoj kiujn vi mem ne aprobis. Vi povas pli multe helpi per malmulta kunlaborado ol per multe da kritikado aŭ eĉ proponado.

Kvankam mi ne plu tenas oficon en la AMERICAN ESPERANTIST COMPANY aŭ en la ESPERANTISTA ASOCIO DE NORDA AMERIKO, mi volonte faros dum liberaj horoj tion, kion mi povas por Esperanto, same kiel faras vi ciuj; kaj ree mi diras al vi—ne adiaŭ sed *ĝis la revido.*

IVY KELLERMAN-REED, PH. D.
*Washington, D. C.*

# OFFICIAL COMMUNICATIONS

Sub ĉi tiu rubriko la redaktoroj volonte presigos komunikaĵojn de ĉiu esperantista societo, kiu havas inter nia legantaro sufiĉe da anoj aŭ kies speciala fako de laboro interesos niajn abonantojn.

## The Esperanto Association of North America

### Central Office: Washington, D. C.

TREASURER'S REPORT

| April Receipts | | Expenditures | |
|---|---|---|---|
| Membership fees | $19.75 | Deficit, April 1st | $3.38 |
| Sustaining membership fees | 2.00 | Postage | 1.25 |
| Examinations | 1.55 | Examinations | .75 |
| Contributions | 1.00 | Office rent | 9.00 |
| Sale of Heralds | 1.15 | Assistants | 6.00 |
| | $25.45 | Cash on hand April 30 | 5.07 |
| | | | $25.45 |

CONTRIBUTIONS

The Special Finance Committee acknowledges with thanks the contribution of $100 from Mr. J. A. Whitcomb of New York City.

THE ESPERANTO HERALD

For the present the publication of the little Esperanto Herald has been discontinued. Inasmuch as The Esperanto Association of North America has already expended more than its income for postage and printing, it has been deemed unwise to place it any further in debt. Also, since Mr. Reed has definitely stated his determination to resign the Secretaryship of the Association soon, and discontinue the Esperanto Office in Washington, the Esperanto Herald would have to be re-entered as a new publication in whatever postal district will be chosen for the new location of the central office of the Esperanto Association of North America.

PASSED PRELIMINARY EXAMINATION

(*Atesto pri Lernado*)

Miss Grace M. Hartshorn, Delphos, O.

PASSED ADVANCED EXAMINATION

(*Atesto pri Kapableco*)

John H. Gray, San Francisco, Cal.

NOTICE

On account of taking over the management of The American Esperantist Company, Mr. Ernest F. Dow has resigned the chairmanship of the Executive Committee of The Esperanto Association of North America. Dr. C. H. Fessenden has been chosen chairman in his stead by the Committee. All communications for the above Committee should hereafter be addressed to Dr. C. H. Fessenden, Newton Centre, Mass.

## NEW ESPERANTISTS

Born to Mr. and Mrs. John M. Geldert, of Halifax, N. S., April 10, 1913, twin daughters.

## ELECTION

The Esperantists of the Central Division (Michigan, Wisconsin and Illinois) have organized as a divisional District, in accordance with the Constitution of the E. A. of N. A., and have just held their election of Councilor, who is to serve also as president of the District. Dr. B. K. Ŝimonek of Chicago was elected to this position. The convention of this District will be held in Detroit the latter part of May. Details may be obtained from Dr. Tobias Sigel, 507 Breitmeyer Bldg., Detroit, Mich.

---

# STUDENTS' ESPERANTO LEAGUE

## NEW RONDO IN DARBY, PA.

A new rondo of the S. E. L. has been organized in Darby, Pa., under the name of the "Darby Esperanto Society." There is already a good sized membership and every prospect of success. In accordance with the arrangement announced in the March number of *Amerika Esperantisto*, Mr. Harold W. Kline, the founder of the rondo, has been chosen First Vice-president of the Students' Esperanto League. We take this occasion both to welcome the new rondo and to congratulate Mr. Kline.

The next rondo organized will be given the privilege of selecting the Second Vice-President. As several rondos are in process of organization, it is expected that the office will soon be filled. If *you* are getting up a rondo, remember that first come, first served.

Miss Isabelle McCaffrey, one of the founders of the Washington Rondo and a member of the Executive Council of the League, has left Washington and is now living in Boston. The Washington Group are all sorry to see her leave, as she has been an enthusiastic worker and her place will be very hard to fill. It is hoped that she will be able to do as much for Esperanto and the League in Boston as she has done in Washington. The well-wishes of all are with her.

---

*Neniam* mallaŭdu tion kion vi ne ŝatas; uzu la tempon por laŭdi tion kion vi ŝatas.

*Iu* ajn povas kritiki, sed nur tiu kiu povas fari pli bone rajtas kritiki, kaj kutime ĉi tiu estas tro okupata.

D-RO RESANIGITA.

# PEREBENDJA

DE ŜEVĈENKO

Perebendja,—maljunulo—
Kiu lin ne konas!
Ĉien vagas li, blindulo,
Ludas sakfajfilon.
Kaj ludanton ĉiam konas
Kaj dankas la homoj;
Li forpelas la malĝojon,
Kvankam mem malĝoja,
Sub ĉielo li pasigas
La tagojn, la noktojn;
Mond' ne havas por li domon,
Mizero petolas
Super lia griza kapo,
Sed li ne atentas!
Li eksidas kaj ekkantas:
"Ho ne bruu, kampo!"
Ekkantinte rememoras
Ke li estas orfo,
Ekmalĝojas, malgajiĝas,
Sidante en ombro . . .

Tia estas Perebendja,
Maljuna kaj stranga,
Li komencas kanti *Ĉalyj*,
Finas per *Horlycja*,
Kun knabinoj, sur la kampo,
*Griĉjon* kaj *Veŝnjanka'n*,
En drinkejo, kun junuloj,
*Serbon* kaj *Ŝynkarka'n*,
Kun la edzoj, ĉe regalo,
Pri la bopatrino,
Pri saliko, malbonsorto,
Poste "En Arbaro,"
En foiro, pri Lazaro,
Aŭ dolorplene
Li ekkantas kiel oni
Ruinigis *Siĉon*.

Tia estas Perebendja
Maljuna kaj stranga!
Li kun rid' komencas kanti,
Finas per malĝojo.

Vento blovas kaj reblovas,
Tra stepo promenas;
Fajfilisto sur tombo sidas,
Ludas sakfajfilon.
Ĉirkaŭ li step' kvazaŭ maro,
Larĝega kaj blua . . .
Post la tombo ree tombo,
Poste nur grizaĵo,
Grizajn harojn kaj la barbon
Vento disblovadas,
Jen kuŝiĝas kaj aŭskultas
Fajfilistan kanton,
Dum ridas la koro, la blindulo ploras,
Aŭskultas, blovetas . . .
Kaŝiĝis blindulo
Sur tomboj en stepo, ke vidu neniu
Ke vento disportu la vortojn tra kampo,
Ke homoj ne aŭdu: ĝi estas Di-vorto;
La koro parolas pro graco kun Dio,
La koro prikantas la gloron de Dio,
Kaj penso post mondo promenas sur nubo.
Simile al aglo grizflugila ĝi ŝvebas,
Eĉ tuŝas ĉielon per larĝa flugilo . . .
Ĝi haltas sur suno kaj tiun demandas
Kie ĝi dormadas, kie levas sin?
Aŭskultas la maron, kion ĝi murmuras,
Demandas la monton pri ties muteco
Kaj ree ĉielen, pro ter' malfeliĉa,
Ĉar sur ĝi, larĝega, ne estas angulo
Por ĉionscianto, por ĉion aŭdanto,
La dirojn de l' maro, dormejon de l' suno,—
Akceptas lin tie neniu en mondo.
Nur sola superas li ĉiujn altege,
Lin konas la homoj, ĉar portas lin tero,
Sed se ili aŭdus ke li en soleco
Kantadas sur tombo, parolas kun maro,
Pri Dia inspiro ekridus nur ili,
Kaj nomus lin stulta, de si lin forpelus,
Dirante, "promenu li super la mar'!"
Bone, mia fajfilisto,
Bone vi ĝin faras,
Ke por kanti, babiladi,
Iras sur tombaron!
Vi iradu, kolombeto,
Dum ne endormiĝis
Via koro, kaj kantadu
Dum aŭdadas homoj.
Por ke ili vin ne timu,
Vi ne spitu ilin:
Faru volon de l' sinjoro,
Ĉar li estas riĉa!
Tia estas Perebendja,
Maljuna kaj stranga!
Li ekkantas ion gajan,
Finas per malĝojo. . .

*El la ukrajna tradukis* CZESLAW KOZLOWSKI, *Selo Prusy, Rusujo.*

# KRONIKO NORDAMERIKA

BOSTON, MASS.—Je la 26a de aprilo oni havis "etan kongreson," kaŭze de la vizito de P-ro Edmond Privat el Ĝenevo, Svisujo. Krom la lokaj Esperantistoj venis samideanoj el Manchester, Montpelier, Worcester, Lawrence, k. t. p. Dum la posttagmezo oni ĝuis ekskurson al la *Arnold Arboretum*. Je la sesa vespere la Esperantistoj kunvenis por festa kunmanĝo ĉe Trinity Court. S-ro E. S. Payson, prezidanto de la Novangluja filio de la ESPERANTISTA ASOCIO DE NORDA AMERIKO, prezidis kaj post mallonga saluto li prezentis la honoratan gaston, P-ron Privat. Poste paroladis D-ro Lowell, vicprezidanto de la E. A. de N. A., tiam oni ĝuis mallongan paroladon de ne-Esperantisto, Rabeno Fleischer, tre eminenta bostonano kiu kore aprobis la Esperantistan Movadon. Post la manĝo ĉiuj iris al la *Publika Biblioteko*, kie P-ro Privat paroladis pri Esperanto al atenta kaj tre kontentiga aŭdantaro. Kiel provo de la efekto produktita, je la fino de la parolado estis necese aranĝi du novajn kursojn, kiuj kunvenos ĉiusemajne.

NEW YORK, N. Y.—Esperanta kurso estas starigita ĉe la Y. M. C. A. per la influo de Roger P. Heller. S-ro Louis Chas. Nelson kondukos la kurson.

DARBY, PA.—S-ro Harold W. Kline instruas grupon da sep knaboj ĉe la adreso N. W. 2nd kaj Greenway Ave. Ĉiu studas entuziasme kaj serioze.

PITTSBURGH, PA.—Jen tre ĝojiga novaĵo: La "Academy of Science and Art," kiu estas filio de la *Carnegie* Instituto en Usono, ĵus starigis Esperantan fakon. Ĉi tiu grava organizaĵo havas proksimume 500 membrojn, kaj rapide kreskas. Ĝi jam havis diversajn sciencajn fakojn, ankaŭ fakojn de iuj naciaj lingvoj, fotografado, pedagogio, k. t. p. La Esperanta Fako tenos almenaŭ ĉiumonate publikan propagandan kunvenon en la bela konstruaĵo de la Instituto; ĝi ankaŭ eldonos presaĵojn pri Esperanto.

WASHINGTON, D. C.—En aprilo S-ro Edmond Privat, el Ĝenevo, Svisujo, vizitis ĉi tiun urbon dum du tagoj. Li havis intervjuojn kun S-ro Woodrow Wilson, prezidanto de Usono, kaj S-ro William Jennings Bryan, Ministro de Fremdaj Aferoj, kiuj ambaŭ sin montris favoraj al Esperanto. Dum unu vespero S-ro Privat paroladis pri "Esperanto kaj Pacifismo" al aŭdantaro ĉe la *Universalist* preĝejo.

Artikolo pri "Esperanto ĉe la Lepruloj en Islando," verkita de S-ino Wilbur F. Crafts, antaŭ nelonge aperis en *Without the Camp* (misiista ĵurnalo).

WARREN, O.—Ĉirkaŭ 20 novaj abonantoj al *Amerika Esperantisto* jam estas varbitaj per la klopodo de S-ro R. R. Schmitt. Ĉi tiu urbo montras tre laŭdindan intereson je Esperanto.

DETROIT, MICH.—La lokaj Esperantistoj gastigos kunvenon de la Esperantistoj de la Centra Apartaĵo de la Esperantista Asocio de Norda Ameriko (tio estas, Illinois, Wisconsin, Michigan), iam je la fino de majo aŭ komenciĝo de junio. Ĉiu Esperantisto en tiuj ŝtatoj estas kore invitata ĉeesti, kaj oni atendas tre agrablan kunvenon. Por plua informo sin turnu al D-ro Tobias Sigel, 507 Breitmeyer Bldg.

WOLVERINE, MICH.—S-ro Paul M. Schuyler paroladis mallonge pri Esperanto ĉe kunveno de instruistoj, kiuj montris tre kontentigan intereson je la lingvo.

CHICAGO, ILL.—La Gradata Esp. Societo finis la lastan kurson kaj okazigis la ekzamenojn je la 20a de aprilo. Je la 25a oni aranĝis balon kiel oficialan fermon de la kurso. Je tiu okazo oni disdonis atestojn al tiuj, kiuj atingis la duan gradon (la tria grado estas la Atesto pri Lernado de la E. A. de N. A.). En la disdonado la plej juna lernanto, 13-jarulo, alparolis la instruiston, transdonante al li en la nomo de ĉiuj gelernantoj belegan pezan poŝhorloĝan pendaĵon, surhavantan globon kun verda steleto kaj vorto *Esperanto*. Sur ĝi estas gravurita lia nomo kun dediĉo. La instruisto, D-ro Ŝimonek, estis tiel kortuŝita ke li preskaŭ ne povis respondi. Tiam oni dankis al la helpa instruistino, F-ino Baŭml, al kiu alparolis unu el la lernantinoj, transdonante al ŝi grandan bukedon da rozoj. Ĉiuj ĉeestantoj estis entuziasmigitaj kiel neniam antaŭe.

STORM LAKE, IOWA.—Bona artikolo pri Esperanto aperis sur la unua paĝo de la *Pilot-Tribune*, verkita de Pr-o Geo. H. Fracker.

ANACORTES, WASH.—En la *Anacortes American* aperis artikolo kolonon longa pri Esperanto kaj la neoficiala uzado de ĉi tiu lingvo, kiun la urbeto jam profitas per la helpo de S-ro F. P. Zent, sperta kaj fervora Esperantisto.

---

## Sur Volgo Vespere

(dediĉata al usona amiko Sro. Herbert Harris.)

Trankvile akvego senhalte moviĝas,
Supraĵo arĝenta belete ondiĝas,
    Malsupre rompiĝas ĉielo bluega,
    Jen de la Volgo aspekto belega!

Radioj de l' suno lastfoje ekbrilas,
Kaj ŝajne al garbo da spioj similas.
    Alvenas dormiga la nokto malluma,
    Kaj poste ĝin sekvas la luno ruĝluma.

Duope ni prenas boaton malpezan,
Timeme sidiĝas sur benkon plej mezan;
    Kaj remas kaj remas kun granda plezuro,
    Rulanta en mezo de ĉarma lazuro;

Nin preterpasadas vidaĵoj frapantaj,
Boatoj kun paroj duope vidantaj;
    Ekfajfas la ŝipoj, kaj ondoj fariĝas,
    En kiuj rapide boatoj moviĝas.

Ekkrias knabinoj renkonten al ondoj,
Turniĝas en supro la sonoj en rondo;
    Antaŭen, antaŭen al verda insulo,
    Rapidas ni tien sur nia "pensulo!"

Dishakas ni akvon per forta ekbato;
Ni estas ebriaj,—nenia kompato!
    Ebriaj de tio, ke estas ni junaj;
    Ni ĝojas do sub la radioj la lunaj;

La roko falkmonta en supro nigriĝas,
Ĝi restas maldekstre. Insulo pentriĝas
    Reliefe kun arboj kaj barkoj komercaj,
    Ni tien alvenas, homidoj potencaj,

Salutas nin arboj, kaj herboj kliniĝas,
Sub paŝoj branĉaĵoj kun krako rompiĝas,
    Demetas ni ĉapojn, sidiĝas sur teron,
    Kaj danke ni laŭdas belegan veteron.

GURIJ FEDULOV,
*Saratov, Russia.*

# BOOK REVIEWS

**La Balŝuoj,** by Octave Gastineau. Translated by L. Carlos. 46 pages. 20 cents. A one-act comedy with two characters, in which the would-be player of a trick finds the tables turned.

**Un Artista en Ajedrez,** by Valentin Marin, with Esperanto translation by Fred. Pujula. 90 pages. 55 cents. A book on chess problems, with illustrations, published by the author of the "Ŝakproblemoj" already known to Esperantists. The Spanish portion of the book is followed by a translation into Esperanto.

**Pri Estetiko en Medicino,** by Mieczyslaw Czerwinski. Translated from the Polish by D-ro Heliodor Ŝwiecicki. 34 pages. 25 cents. An essay on the esthetic side of the work, life and duty of the physician, and certain esthetic factors in his tasks.

**Laborista Klaso kaj Socialismo,** by Marcel Cachin. Translated from the French by L. Berland and L. Vergnaud. 19 pages. 10 cents. A general essay of discussion, definition and explanation, clearly set off in paragraphs with headings.

**Kion Patrino Povas Suferi,** by Hendrik Conscience. Translated from the Flemish by Frans Schoofs. 40 pages. 20 cents. A little story of charity in a pitiable case of destitution. A slight sketch written effectively by the hand of a master of the pen, and well translated.

**Studo pri la Organizo de Esperanto.** 63 pages. 25 cents. Selections from various numbers of Franca Esperantisto. Discussions in parallel columns of French and Esperanto, on methods of general and international organization.

**L'Esperanto Methodique,** by L. C. Deslaurier. 105 pages. 45 cents. A new "Cours Complet," that is to say, a new text-book of Esperanto in French. With introduction by E. Boirac, Rector of the University of Dijon.

**Petaloj,** by Czeslaw Kozlowski. 28 pages. 20 cents. A collection of 18 poems, mostly short. These are original in Esperanto, and will be interesting to readers poetically inclined, although the heights aimed at are not always sustained.

**Propaganda Piedvojaĝo al la Oka Internacia Esperantista Kongreso,** by V. N. Devjatnin. Illustrated. 94 pages. 45 cents. An account of a trip which bears a striking resemblance to the "suffrage hike" from New York to Washington. The purpose in both cases was to carry ideas to the general public and especially the isolated country people, and in both it seems to have been accomplished. The trip from

Paris to Cracow was made by a Russian (who writes the account of it) and a Turkish Esperantist.

**Esperanta Legolibro por Lernantoj**, by Dr. Andreo Fiŝer. 113 pages. 25 cents. A useful book of prose, poetry and anecdotes, translated and original also, now in its second edition. (Title of first edition was **Internacia Krestomatieto.**) The inclusion of several of Dr. Zamenhof's speeches makes the book especially desirable.

**La Premiito**, by Herschel S. Hall. 24 pages. 6 cents. This is No. 1 of a new series of booklets, "Poŝbiblioteko," published by the firm which issues *La Ondo de Esperanto*, in which this prize winning story was originally published. The story has intrinsic interest, and should win the more attention in this country since it is the work of an American who is already favorably known to readers of *Amerika Esperantisto.*

**Tra la Loko Ensorĉita**, by J. Ŝirjaev. 15 pages. 6 cents. No. 2 of the above-mentioned series. It is worth while to read these two books in sequence, to note how little variation there is in the style of writers of different nationalities if their Esperanto is carefully written.

**Tacoma.** Published by the *Tacoma Commercial Club* and *Chamber of Commerce.* A large and handsome guidebook, with colored illustrations and with a four page Esperanto supplement. This will be sent free to any one who is seriously contemplating emigration to the state of Washington and especially the attractive city Tacoma and its vicinity. That these two organizations find it worth while to use Esperanto (as they have done on several previous occasions) is a fact which makes the book of especial interest to Esperantists. The translation was done by Mr. Lehman Wendell, author of *Sub la Meznokta Suno*, *La Lasta Usonano*, etc

---

## KIAMANIERE ŜI REMEMORIS

Ŝi estis kvarjara kaj tute vivema,—dancanta ridanta brunokula elfo. Ŝi ĝuegis iri al dimanĉa lernejo, sed ĉiun impreson, kiun la knabineto ricevis, jam de longe estis sole muzika, tial estis granda komforto kiam ŝi anoncis unu dimanĉon je sia reveno, "Mi lernis ion!"

"Kio estis tio, karulino," demandis la plezurigita patrino.

"Nomoj," ŝi respondis, mallonge. "Sed mi ne povas rememori ilin."

"Eksidu, kaj forte penu!" proponis la patrino.

Tial la knabineto kuntiris la brovojn, kaj penegis ekmemori. "Ho, nun mi scias," ŝi ekkriis, supren saltetante.

"Nu, kio?" demandis la ekscititaj gepatroj.

"Mateo!" Tiam ŝi preskaŭ forgesis, sed ankoraŭ unufoje rememoris, dum ŝiaj okuloj lumetis: "Mateo! Marto! Aprilo! Majo!"

*El la angla tradukis* E. D. K.

# BARGAIN SALE!!

On taking inventory of the books shipped from Washington we find a number of copies of various books which are shopworn, or with covers slightly faded or soiled. They are just as good for reading purposes as new ones but owing to their appearance we cannot sell them as perfect goods, and in order to turn them into cash and make room for new books we will send you a package which at regular prices would be worth at least $1.25, for 50 cents. If you will tell us what class of books you wish we will try to select the ones you want as far as possible and the sooner you order the more likely we will be able to make a good selection. DO IT NOW.

THE AMERICAN ESPERANTIST CO., Inc.
West Newton, Mass.

## BOOKS BY EDMOND PRIVAT

KARLO . . . . . . . . . . $.15
TRA L'SILENTO
(Parchment binding with red and gold lettering) .40
(Limp chamois with gold lettering) . . . . .60
HISTÒRIO DE ESPERANTO (Paper) . . . . .20
ESPERANTO IN FIFTY LESSONS (Cloth) . . .50

**The American Esperantist Co., Inc.**
**West Newton, Mass.**

# LA REVUO

*The best literary magazine entirely in Esperanto* :: ::

The only magazine which has the constant collaboration of
DR. L. L. ZAMENHOF, *the author of Esperanto*

Yearly Subscription $1.40 Single Copy, postpaid, 15 cents

THE AMERICAN ESPERANTIST CO., Inc.
AGENTS FOR U. S. A.

N. B.—The American Esperantist Company has on hand a quantity of back numbers, equally as good as current numbers from a literary point of view. These we will dispose of, as long as they last, at ten cents a copy, twelve copies for $1.00. We can not guarantee to send any special numbers at this rate.

Legu tiun ĉi Esperantan Libron

## TRADUKOJ TRI

Enhavas tri beletajn ĉarmajn rakontojn de Kanado, tradukitajn de konata Kanada Esperantistino, Sino. L. deL. Helliwell.

La rakontoj estas

Je la Nomo de la Reĝino

Serĉado por Fantoma Knabino

Idilio de Kebeko

55 paĝoj. Bone presita kaj bindita (papere) 25 cendoj afrankite, ĉe

**THE AMERICAN ESPERANTIST CO., Inc.**
WEST NEWTON, MASS., USONO

---

Esperanto-Ŝlosilo Usona Eldono

## ESPERANTO KEY

### A New Edition!

You will want a number of these at once. Start in by writing a note *in Esperanto* to three or four non-Esperanto friends, either out-of-town people or in your own city, and enclose a copy of the Key.

The new edition contains more description of "the why and wherefore" of Esperanto, and is therefore a still more valuable propagandilo. You can not get along without these. Let them do some of your talking,—it saves breath!

25 Keys in the English language for only 25 cents. 100 for only One Dollar. (But two cents apiece if you buy only one at a time.)

**American Esperantist Co.**
**West Newton, Mass.**

---

## ESPERANTO STATIONERY

Fine quality paper with engraved green star and word "Esperanto."

One quire, with envelopes to match, 65c. Sample sheet and envelope, 4c.

**American Esperantist Company**

---

## Rakonto kaj Aventuro

Contains two excellent short stories in good original Esperanto. A neat little book of 31 pages, just the right size for your pocket. Read it on the car or in the train. It costs only fifteen cents,

**AMERICAN ESPERANTIST CO., West Newton, Mass.**

---

## Foreign Magazines

Twelve copies, our selection, back numbers, for only sixty cents

**American Esperantist Co.**
**WEST NEWTON, MASS.**

---

## POLA ESPERANTISTO

Monata gazeto, aperadas okan jaron, ĉiam pliinteresigante sian programon.

En 1613-a jaro "P. E." krom 12 ilustrataj, zorge redaktataj numeroj en klasika, pure fundamenta Esperanto, donos al siaj abonantoj senpagan:

### "Literaturan Aldonon"

(200 paĝa volumo)

**"Pola Esper."** enhavas konstantajn rubrikojn: Propagandaj artikoloj. * Esperantaj demandoj. * Rakontoj, noveloj, poezioj. * Populare scienaj artk. * Scieco kaj Vivo. * Opinioj. * Kondsideru! * Kroniko. * Korespondaĵoj. * El Esper. Mondo. * Faktoj. * Bibliografio. * Revuo de la gazetoj. * Konkursoj kaj problemoj. * Humoraĵoj. * Respondoj de la Redakcio. * Muziknotoj. * Ilustraĵoj. * Anoncoj.

*Sendu abonpagon ($1.40) al la American Esperantist Company, West Newton, Mass.*

---

LONDONO: Tre centrala Pensiono por ges-roj. Hejmaj komfortoj. Bano. Moderaj prezoj. S-ino O'Connor, Esperanto House, 17 St. Stephen's Squ. Bayswater, London.

---

## LA ONDO DE ESPERANTO

MONATA ILUSTRATA REVUO
(fondita en la jaro 1909).

La abonantoj de la j. 1912 jam ricevis *senpage* romanon de A. Tolstoj "*Princo Serebrjanij*", kies prezo por ne-abonintoj estas *Sm.* 1,60 *afr.* Nun ĉio abonanto de la j. 1913,—krom 12 n-roj de l'gazeto—*senpage* ricevos *donace* post kelkaj monatoj belan Esperantan libron:

"ORIENTA ALMANAKO"

*el la lingvoj japana, ĥina, araba, hinda, sanskrita, persa, armena, kartvela k. t. p. k. t. p.*

"La Ondo" aperas akurate la 1-an daton, novstile. Ĉiu n-ro havas 16—24 pag. Formato 17x26. Bela kovrilo.

Literaturaj konkursoj kun premioj. Portretoj de konataj Esperantistoj. Diversaj ilustraĵoj. Beletristiko originala kaj tradukita. Plena kroniko. Bibliografio. Amuza fako (kun premioj). Anekdotaro. Korespondo tutmonda. (Poŝtk. ilustr.)

*Sendu abonpagon ($1.10) alla American Esperantist Co., West Newton, Mass.*

---

### You Ought to Take

## SCIENCA GAZETO

*A monthly magazine entirely in Esperanto, devoted to Science and Industry*

Contains semi-technical articles on many interesting subjects. Subscribe for your own pleasure—and show each copy to some scientific friend.

*Send Subscription ($1.50) througl American Esperantist Company, West Newton, Mass.*

(Sample copy, 20 cents)

Have You Secured Your

**Millidge Esperanto-English Dictionary?**

An invaluable book (496 pages) printed on strong thin paper with wide margins, and **durably bound.**

**You can not get along without it.**

PRICE $2.00

**THE AMERICAN ESPERANTIST CO.**

WEST NEWTON, MASS.

Are you studying Esperanto?
Do you want help?

Would you like to have your exercises corrected regularly and all difficulties explained?

WRITE FOR CIRCULAR TO

THE AMERICAN SCHOOL OF ESPERANTO

WASHINGTON, D. C.

A High-Class Correspondence School of Esperanto

Helpu Esperanton en la Oriento!

## JAPAN TRADE REVIEW

Monata Ilustrita Revuo kun

**ESPERANTA FAKO**

Jare: Sm. 2.00; Unu Kajero Sm. 0.20

Adreso: 4 Yurakucho-Itchome
Tokio, Japanujo



## THE AMERICAN THEOSOPHIST

*A magazine dealing with Theosophy and Occultism, Universal Peace and the Wider Tolerance*

Official Organ of The American Section of The Theosophical Society

Mrs. Annie Besant, President — Albert P. Warrington, Gen. Secretary and Editor

$1.50 a year — Single Copy 15 cents — Foreign $2.00

Address: Krotona, Hollywood, Los Angeles, Cal.



## LA KOLOMBA PREMIO

A humorous sketch translated from the French of the great Dumas.

A nicely printed 48-page book, handy to carry around with you, and most enjoyable reading. Only 20 cents.

**The American Esperantist Co., Inc.**
West Newton, Mass.



## ĈIO

(By Mrs. Winifred Sackville Stoner)

Consists of fifty cards, each bearing forty Esperanto words. It is so named because with a set of ĈIO cards almost an unlimited number of games can be played.

The most ludicrous combinations are evolved by the players, and many amusing incidents serve to fix the meaning of the words in mind.

ĈIO is printed on heavy ivory finish playing cards, round corners, tinted backs. Each set is packed in a neat carton of tough cardboard.

PRICE, FIFTY CENTS

**The American Esperantist Co., Inc., W. Newton, Mass.**



JUST WHAT WAS NEEDED

Interesting Piano pieces for little children to play. Names and Subjects *in Esperanto*. Stayner's "Very First Piano Pieces" Book I (15 pieces), 60 cents. Breitkopf & Hartel, 24 W. 20th St., New York.


## DEZIRAS KORESPONDI

[Unufoja anonco kostas 20c. (40 Sd.) por ĉiu linio. Kvarfoja anonco kostas 50c. (1 Sm.) por ĉiu linio. Linio enhavas proksimume 45 literojn punktojn aŭ spacojn.]

S-ro J. Teply, semb. ul. 124, vys. Myto, Bohemia-Austria.

S-ro Julian E. Fast, Delphos, Ohio. Ĉiam respondos.

S-ro Konstantin Pavloviĉ, str. Golutvino, Ejov, Moskva, Russia, interŝanĝos P. M., P. K., insektojn, plantojn, papiliojn, kaj mineralojn por kolektoj.

S-ro Tades Libke, Sadovastr N. 30, Kovno, Russia.

Jos. Ŝmula, farmaciisto, Ronŝperk, Bohemia-Austria, P. K., P. M., Ĉiam respondos.

F-ino E. Esther Owen, Southland Seminary, Gainesville, Fla., Usono, deziras korespondi kun ge-esperantistoj vojaĝontaj Eŭropon aŭ venontaj Floridon.

J. Curda, studento, Balbinova ul. 25, Jiĉin, Bohemia-Austria. Ĉiam respondos.

S-ro P. T. Moskalev, Akm. Obl., Petropavlovsk, Russia. Ĉiam respondos.

S-ro K. Ĥonin, Mesĉanskaja 23 kue 7, St. Petersburg, Russia.

S-ro Sifo, eldonisto, c-o S-ro Tsang Kwan, Ngah, Standard Oil Co., Shameen, Canton, China, korespondos kun gesamideanoj pri Anarĥismo kaj la revolucia movado de ĉiuj landoj.


## VIDINDAĴOJ DE BOSTONO KAJ ĜIAJ ĈIRKAŬAĴOJ

Bela gvidlibro de Bostono, presita kaj angle kaj esperante, bone ilustrita kaj bindita (papere).

Se vi vizitos Bostonon vi bezonos ĝin kiel gvidlibron; se vi ne vizitos, vi bezonos ĝin por sciiĝi pri la belaĵoj tie.

25c ĉe

**The American Esperantist Co., Inc.**
West Newton, Mass., Usono.




**LA "UNUA LECIONO"**

Vivas hodiaŭ multaj avinoj, kiuj antaŭ sesdek jaroj ricevis sian "unuan lecionon" ĉe

**Emerson' Piano**

Kaj tiun pianon ili ankoraŭ plej amas.

*Vendistoj en ĉefaj urboj kaj urbetoj.*

*Petu katalogon.*

**EMERSON PIANO CO., Boston, Mass.**